

BOHEMA REVUO ESPERANTISTA

kun literatura aldono

LEGOLIBRO DE BOHEMAJ ESPERANTISTOJ

Oficiala organo de bohemaj Esperantistoj Raj de CENTRA ASOCIO BOHEMA UNIO ESPERANTISTA (B. U. E.)

Ni laboros por Esperanto.


CENTRA ASOCIO BOHEMA UNIO ESPERANTISTA. SÍDLO: PRAHA I. 342. KAVÁRNA „UNION" KANCELÁŘ A UČEBNA: II. VODIČKOVA ULICE 38. REDAKCE REVUE: II. DITTRICHOVA ULICE 7.

Členové klubů sdružených v „Ústředním Svazu Bohema Unio Esperantista" a těch, které za jeho součinnosti se ustavují, dostávají tuto revui za roční předplatné K 2·50 prostřednictvím pp. jednatelů. Roč. I.—IV. pro členy B. U. E. po K 2·20.

Klub Esperantistů v Praze („U Donátů") dává svým členům tuto revui zdarma.



1911. **DUBEN — APRILO.** **V. 4.**



Roční předplatné: 3 K. Roč. I.—IV. po K 2·50. **Cena tohoto sešitu s přílohou: 30 hal.**

ČASOPIS ČESKÝCH ESPERANTISTŮ
BOHEMA REVUO ESPERANTISTA

vychází 10krát ročně (kromě srpna a září). | eliras monate (krom aŭgusto kaj septembro).

Redaktor: **Ed. Kühnl.**

Předplatné (ročně **3 K** pro Rakousko, Fr. 3·75 pro cizinu), a vše týkající se časopisu, budiž zasláno pouze na adresu: „Časopis Českých Esperantistů", Praha II.-2023, Dittrichova ul. 7. Redakce vyhražuje si právo upraviti články pro tisk. Netištěné rukopisy se vrátí, byla-li přiložena známka; pracem původním dána přednost. Abonpago, akceptata por almenaŭ unu jaro (**Fr. 3·75** = 1·50 Sm por fremdlando, 3 K por Aŭstrio), kaj ĉio, kio koncernas la gazeton, estu sendata laŭ adreso:

„Časopis Českých Esperantistů" en Praha II. (**Bohemujo - Aŭstrio**), II.—2023. Dittrichova ul. 7.

La redakcio rezervas por si la rajton korekti la manuskriptojn por la preso; la nepresitaj manuskriptoj estos redonitaj, se oni almetis poŝtan markon. Originalaj artikoloj prefere akceptataj.

* Účet poštovní spořitelny 93.281. *

OBSAH — ENHAVO:

J. A. COMENIUS.*)

Al fervora nederlanda samideano J. L. Bruijn dediĉas Dr. St. Schulhof.

Ĉu Vi konas malgrandetan urbon,
kiu ĉe Vi, ie en la Nordo
kuŝas' dolĉe ĉe la mara bordo?
Naarden estas ĝia simpla nomo
kaj en tombo tie sub la tero
dormas dormon tute sen sufero
sanktaj restoj de l' plej bona homo.

Se Vi konas urbon tiun vian
kaj Vi venos tien per okazo,
mi Vin, sinjor', petas kun emfazo,
lin vizitu en libera horo.
Por la samaj celoj ideaiaj,
kiujn ni nun sekvas, plej kristalaj,
batis ankaŭ lia bona koro.

Kiel Vi kaj mi, li ankaŭ sonĝis
en la verkoj belaj sen komparo,
pri la unueco de l' homaro,
pri eterna kaj senĉesa paco;
sed al li kaj lia flama vorto
malfavora estis viv' kaj sorto
kaj sur tero mankis por li spaco.

Sed li fine trovis la trankvilon
kaj kun sonĝo sia, ĉarma, granda,
en malgranda urbo nederlanda
dormas tiu nia antaŭulo
kaj sur lia tombo jam sen larmo
kantos nune nur la birda svarmo
kaj ekfloras simpla konvolvulo.

Se Vi tien venos, mi Vin petas;
diru al li, ke en lia lando
estas nune viva propagando
por la sonĝo lia filozofa,
ke en kor' de multa jam Bohemo
gaje kreskas lia bela semo
en la form' de lingvo Zamenhofa.

23./III. 1911.

---

*) Elparolu: Komenius (boh.: Komenský). Tiu ĉi poemo aperis en la esperanta rubriko de la holanda gazeto „De Avondpost“ en Haag.

SEN TITOLO.

LUPO KAJ ŜAFIDO. Leono, maljuna reĝo, estis malkontenta. La tutan imperion agitis centjara konflikto, la konata konflikto inter la lupo kaj la ŝafido, inter kiuj oni ne povis trovi konsenton. La lupo ĉiam plendis je ŝafido, ke ĝi malklarigas al ĝi la akvon kaj la ŝafido, starante sube en la rivereto, asertis, ke tio estas neebla, ĉar la akvo fluas de la lupo al ĝi.

„Mi ne povas pli longe toleri tiun ĉi disputon en mia regno!“ decidis la reĝo, estas necese iel ordigi la malĝojigan konflikton, kiu malhelpas fruktodonan laboron!“

Estis elektita paciga komisio, sed konsento ne estis atingata. La lupo kulpigadis la ŝafidon kaj ĉi tiu ĵurasertis je dio, ke ĝi estas senkulpa.

Kaj jen venis vulpo kun nova propono: „Oni restigu la lupon kun la ŝafido izole (solece), ili mem private interkonsentu!“

Tuj oni enfermis ambaŭ en firman kameron; du tagojn oni restigis ilin tie, por ke ili interkonsentu.

„Nun mi esperas, ke ili jam interkonsentis!“ diris la vulpo kaj ruze grimacis. Oni malfermis la kameron kaj jen! la vulpo estis sola!

„Nu, ĉu vi interkonsentis kun la ŝafido?“ demandis la vulpo. „Ni interkonsentis!“ respondis la lupo ĉirkaŭlekante sian buŝon.

Kaj por ĉiam estis forigita la centjara konflikto kaj la vulpo rekompence estis nomita la plej supera inter la superaj en la regno. *(El „Švanda Dudák“ 1911. trad. N. V.)*

HONZA — KONSOLANTO. Dum Honza*) estis ankoraŭ hejme, volonte li helpadis al la gepatroj ĉe diversa laboro. Foje post matenmanĝo diras la patro: „Honza! prenu segilon kaj hakilon, ni iros por kolekti lignon.“

Honza faris ekzakte, kio al li estis dirite, tiel ke la patro eĉ ekmiris pro lia prudento. — Post nelonga tempo ili venis sur krutaĵon, kiu estis de arboj maldense kovrita.

Feliĉe ili subhakis kaj subsegis unu arbon, sed ĝi ruliĝis for de ili en valon. Por ne iri malsupren, prefere ili faligadis la alian, sed ĝi same tiel, kiel la unua, forruliĝis de ili. La patro jam ne sciis kion fari, sed fine tamen li ion elpensis.

Vere, ĝi estis penso, inda je patro de Honza. Li prenis ŝnuregon, per ĝi ĉirkaŭligis sin kaj la arbon, supozante, ke li tiamaniere retenos la arbon.

---

*) Honza (nomo de Johano - Jan - Hans) estas en la bohema literaturo tipo de persono malsprita, naive malsaĝa.

Sed kiam la arbo falis, ĝi ruliĝis malsupren, posttrenante la patron. Honza neniom ektimis, male li kun ia plezuro rigardis, kiel jen la arbo, jen la patro estis supre aŭ malsupre.

„Arbo gajnis, patro gajnis“, kriis Honza, ĝis kiam la arbo kaj patro enruliĝis en la valon.

Poste li eksidis kaj atendis la patron. Sed tial, ke la patro longe ne revenadis, Honza ekpensis:

„Li ja post mi venos“ kaj kolektinte la ilaron, li iris hejmen.

„Kie estas la patro?“ demandis lin la patrino.

„En valo.“

„Kaj kion li tie faras?“

„Kun arbo li interbatiĝis kaj nun li kuŝas sub ĝi — li malgajnis.“

La patrino lasis al si ĉion rakonti kaj post longa divenado fine ŝi sciiĝis, ke la patro estas morta, kaj ŝi ekploris.

„Ho, ne ploru, panjo!“ konsolis ŝin Honza, „almenaŭ vi ne bezonos tiom multe da manĝajo kuiri, kiam ni estos nur du.“

Trad. Jos. Podlipský.

CIGANOJ. Unufoje staris du ciganoj sur foirejo en Sarajevo kaj disvendadis korbojn. „Jen, homoj,“ kriis la unua, „por tridek paraoj unu korbo!“ „Por dek kvin paraoj unu korbo!“ kriis la dua. Post kiam ili elspezis sian profiton en drinkejo, diras la unua cigano: „Kiel ci tion faras, Rom, ke ci povas vendi ciajn korbojn tiel malkare? Mi ŝtelas vergojn kaj tamen mi ne povas doni miajn korbojn po dekkvin paraoj.“ „Ho, Rom,“ respondis la alia, „mi ŝtelas pretajn korbojn.“

ABIOJ KAJ PICEOJ. El blua firmamento radias vibranta, serena, viva lumo. La genciano odoras. Sur haladzantaj deklivoj floras primoloj, senkulpaj anemonoj — kaj sub la rokaro je la sunflanko en ruĝeta filikejo ĝermas la unuaj violoj. Senbrue rampas la fumo el kamentuboj, penetras la printempan aeron kaj refalas kvazaŭ delikata silka vualo sur malvarman, nuban bluon de abia arbaro tronanta super vilaĝo. Rigide, majeste kaj senmove rigardas abioj kaj piceoj alten tra brilanta aero. — Ili estas tiel malgajaj. Pri kio ili meditas? — La nova vivo triumfas, kaj ili — . . .? Por ili estas ĉio egala; printempo kaj somero, aŭtuno kaj vintro. Ili restas indiferentaj, malvarmaj kaj melankoliaj. Ilia koro suferas kaj neniu aŭdas ĝin suferi. Ili ploras larmojn, neniu vidas larmojn. Rigardante vin, mi sentas doloron. Kial estis la naturo tiel senfavora al vi, miaj karaj abioj kaj piceoj? Miaj abioj, miaj piceoj, — ankaŭ mi esperas jam nenion. Ankaŭ mia vivo estas kiel la via — plena da profunda, malsana, ardanta sopiro. — Mia koro suferas, neniu aŭdas ĝin suferi. Mi ploras larmojn, neniu vidas larmojn. Viaj akraj, pintaj folioj, tio estas rigidiĝintaj

larmoj — ho, mi scias tion bone. Kaj via verda koloro, tio estas profunda, ardanta sopiro je eterna printempo, kiu tamen ne alvenos. La koroj suferas, neniu aŭdas ilin suferi. Larmoj fluas, neniu vidas larmojn. (*El Bosnio. El Petar Kočić, trad. Nebuška.*)

„INTERNACIECO" DE LA SPORTO.

Bohemoj havas memstaran reprezenton en la internacia komitato por la Olimpiaj Ludoj kaj nunjare por la kvara fojo ili delegos siajn luktistojn al tiu ĉi plej brila sporta kaj gimnasta revuo pri kapableco de la ĉefaj tutmondaj nacioj. Bohemoj havas la rajton anonci ĉiujn sportobranĉojn krom la futbalo, ĉar la F. I. de F. A. per influo de la F. A. Ltd. sukcesis valorigi ĉe la Londona Olimpiado la nesportan vidpunkton de la malnova federacio kaj eligis el partopreno la membrojn de la nova internacia amatora unio, kies membroj estas ankaŭ Bohemoj. Krom tio estas ĉi tie ankoraŭ alia malnormalaĵo. La bohema malpeza atletiko estas same bojkotata kiel futbalo, sed tamen, kaj plenrajte ĝi estos reprezentata ĉe la Olimpiado. Se la afero ne estus aperaĵo malĝojiga, ĝi estus ridinda. Tiu ĉi nelogika vidpunkto estas nova pruvo pri la nekonservebleco de ekzistanta stato en la sporta vivo. La internacia olimpia komitato sekvas sole la altan celon starigi idealan harmonion de ĉiuj civilizitaj nacioj per brila revivigo de ludoj de antikvaj Helenoj kaj ĉi tie pro trudo de futbala federacio ĝi estos devigata rifuzi partoprenon de multaj nacioj. Ĉu tio servos al sporto, se el la Olimpiado estos eksigitaj la amatora Britujo, Bohemujo, Francujo, parto de Belgujo, de Svisujo, Hispanujo kaj Galicio? La internacia komitato olimpia povus ĉi tie bonege servi per graveco de sia sporta signifo kaj per siaj altrangaj societaj rilatoj kaj venigi pacon en signo de olimpiaj ludoj, kiuj estas festo de la tuta civilizita mondo. Nepartopreno de la nomitaj nacioj, sekvantaj severe principon de egalrajteco inter ĉiuj, estos nepre disharmonia tono ĉe la ludoj kaj honto de tiuj, kiuj per pli favora fato atingis la potencon politikan kaj ĝin malbonuzas laŭ maniero absolute nemorala kaj kun la senco de la vera sporto neniel kunigebla. Estas absolute necese, ke estu laŭ ebleco plej baldaŭ entreprenitaj paŝoj por paciga solvo de la disharmonio inter ambaŭ grandaj futbal-korporacioj, pli frue ol tiu ĉi batalo reflektiĝos ankaŭ en aliaj branĉoj de sporto. Kompreneble, la principo de libereco por ĉiu nacio devas esti defendita, ĉar kio restus el la sporta luktado, se en multaj landoj malaperus la individueco de nacioj en kadro de la ŝtata limpartigo kaj se estus forigita tiu potenca risorto, kiu fortigas la individuon en batalo por sukcesigo

de lia nacio kaj donas al li tiun entuziasmon, kiu estas bela kaj nobla trajto de la sporta luktado. Problemoj, kiuj potence efikas je fato de nacioj, ofte estis solvataj pace (ne estas eble ne citi la politikan duoniĝon de Svedujo kaj Norvegujo, kie la divido de la ŝtata formacio imponis al la tuta mondo), kial ne estus eble solvi la sportajn konfliktojn laŭ vojo de maturaj konsideroj kaj per formo liberala? La progreso ĝin postulas, ke individuo kaj nacio povu libere evoluadi, kial ĝuste la plej juna branĉeto de la novepoka kulturo, la sporto, konservadu principon, kiu staras en opozicio al libereco de ago kaj de ideo. La sporto, same kiel ĝi vekas estimon al rivalo, vekas ankaŭ la fierecon pri nacieca aparteno kaj tial pli eble estos enterigita en kelkaj landoj la sporta movado ol ke valoriĝu la utopio kunigi ĉe sporto la naciojn en politikajn formaciojn, kiuj absolute difektus la trajton de nacia karaktero kaj subpremus valorigon de ĝia individueco. Ĉiuj similaj provoj ĝis nun malsukcesis kaj ankaŭ estonte malsukcesos, ĉar la memfido de ĉiu nacio kreskas proporcie al energio, kiun oni aplikus por ĝia subpremo. *(Laŭ „České Slovo“, n-o 94.)*

HISTORIO DE ESPERANTO.

Konsiderante la nunan tempon konvena per publikigo de kelkaj artikoloj rilate la historion kaj la staton de Esperanto en la mondo, ni dissendis al niaj fremdlandaj amikoj leterojn kun peto pri respondo je kelkaj demandoj tuŝantaj la elektitan temon. Jam ofte ni estis demandataj de samideanoj pri la fontoj, kiuj instruus ilin pri la pasinteco en nia movado kaj ni povis sole rekomendi al ili la tralegadon de ĉiuj (almenaŭ de la ĉefaj) malnovaj revuoj. El la verketoj speciale pri la historio traktantaj ni povas citi tiun de la Lyona Grupo Esp. (tiu tamen estas jam „antikva“, ĉar ĝi parolis pri la „nuna“ stato de Esperanto en jaro 1905) kaj kelke da artikoloj en L' Espérantiste, kiuj estas nefinitaj. Ĉiuj „samtempaj“ statistikoj havis valoron sole efemeran kaj ne estas plu elserĉataj. La plej valora artikolo el historio de Esperanto nepre estas la letero de Dr. Zamenhof al N. Borovko (vidu la Lernolibron): Pri la deveno de Esperanto. Kiu do volas studi pli detale nian aferon, komencu per tralego de tiu ĉi letero kaj nur poste serĉu la pluajn sciigojn. Ni intencis en formo de broŝuro disponigi al la kandidatoj por la ekzameno la urĝe bezonan studmaterialon, kiu prezentus al ili ĉion en la plej konkreta formo. Nia volo estis bona sed la cirkonstancoj ne estis tiel favoraj, kiel ni esperis. Ni longe devus atendi je ĉiuj respondoj el la diversaj landoj kaj kiam ili venus kaj se eĉ tuj ili estus presitaj, ili ne estus kompletaj — la tuta verketo per tio ne fariĝus sufiĉe perfekta. Ni devas por tia laboro farebla sole paŝo post paŝo veki pli multe da intereso inter ĉiuj malnovaj amikoj kaj subtenadi nian

proponon per laŭebla presigado de la ricevataj respondoj, kiuj estu ŝtonoj por la laboro projektata. Ni fine devas atentigi pri la temo Historio de Esperanto, kiu troviĝas inter la temoj por la literatura konkurso de la nunjara kongreso Antverpena. Ni ĝoju, ke ankaŭ tiu ĉi alportos al ni bonan helpilon. Kelke da utilaj konsiloj por studontoj troviĝas en la rekomendinda verketo „Albumo de konataj Esperantistoj“ (eld. de s-o Schuck en Braunschweig) kaj en la biografiaj artikoloj de „Universo“ (eld. de f-c Heckner en Wolfenbüttel ap. Dresden). Ni ankoraŭ atentigos sur tiu ĉi loko pri la fontoj, pri kiu oni informos nin.

El multaj landoj ni ricevis jam tre utilajn informojn, kiuj de tempo al tempo aperados en nia revuo.

HISTORIO DE ESPERANTO EN USONO.

Neniu povas diri precize, kiam falis la unua semo de Esperantismo en Usonon.*) Kvankam oni ofte renkontas Eŭropanojn, kiuj antaŭ dek, dekkvin aŭ eĉ dudek jaroj komencis studi la internacian lingvon, malofte oni povas trovi Usonanon, kiu antaŭ eĉ kvin aŭ ses jaroj sciis pri Esperanto.

Unue tiuj, kiuj interesiĝis pri la afero, estis personoj origine el Eŭropo, kiuj okaze sciiĝis pri ĝi per amikoj ankoraŭ restantaj en Eŭropo. Aliaj konatiĝis kun Esperantistoj dum vojaĝado en Eŭropo kaj hejmen alportis la novajon. Sed ĉiuj ĉi estis nur izolitaj Esperantistoj, kiuj iom studis sed preskaŭ ne kuraĝis propagandi pro timo de mokado, aŭ kiujn la propagando mem ne interesis aŭ allogis. La komenco de propagando en ĉi tiu lando kompreneble estas tute alia afero ol en Eŭropo. Usono estas pli granda ol la tuta Eŭropo, tamen ĝi uzas sole unu lingvon, tial oni diris „kial oni bezonas alian lingvon ol la anglan?“

La unua propaganda centro estis en urbo Boston, kie fondiĝis la Bostona Esperantista Societo, precipe per la laboro de s-oj J. F. Twombly, Edward F. Harvey kaj Dr. D. O. S. Lowell. Ĉi tiu societo post iom da studado inter la anoj komencis forte propagandi per publikaj paroladoj kaj instruadi. Baldaŭ oni organizis grupojn en urboj Philadelphia, Chicago, kaj New-York. Tiam la Bostonanoj komencis organizi asocion, al kiu aliĝis ĉiu societo kaj izolita Esperantisto. Per iliaj klopodoj la Amerika Esperantista Asocio fondiĝis kaj la societoj kaj Esperantistoj kuniĝis por la propagando. Per ĉi tiu asocio, kies centro restis en Boston kaj kies sekretario estis s-o Twombly, oni baldaŭ starigis grupojn en en aliaj urboj en Usono kaj la nacia propagando vere komenciĝis. La unuan de januaro 1907 per monhelpo de kelkaj individuoj, spe-

*) Usono: *United States of Nord America.*

ciale de s-o Twombly, la asocio komencis eldonadi la ĵurnalon „American Esperanto-Journal", kiel oficialan organon de ĉiu tiu asocio kaj de ĝiaj grupoj.

Preskaŭ samtempe en la malproksima sudokcidenta ŝtato Oklahoma s-o Arthur Baker ekinteresiĝis pri Esperanto kaj la unuan de februaro 1907, tute ne sciante pri la alia ĵurnalo, komencis eldonadi „Amerika Esperantisto". Ĉi tiu ĵurnalo faris multe da propagando, kaj la abonantaro tiel bone pligrandiĝis, ke s-o Baker baldaŭ translokigis sian eldonejon en la grandan mezlandan urbon Chicago, kaj tie starigis la „Amerikan Esperantist Company" (Amerika Esperantista Kompanio), por la eldonado de la ĵurnalo kaj de libroj kaj por la importado kaj venigado de libroj el Eŭropo.

Dum ĉi tiuj monatoj de ĵus komencita propagando la Am. Esp. Asocio ne estis tre forta, nek tute kontentiga, kvankam ĝi sendube faris la movadon pli forta ol antaŭe. En aŭtuno de 1907 oni komencis pli fortan kunligadon de la Esperantistoj per fondado de la Illinois Esperantista Asocio, nome asocio aŭ federacio de grupoj kaj individuoj en la ŝtato Illinois. Krom izolitaj Esperantistoj ĉi tiu federacio konsistis el societoj en Chicago, Rockford, Elgin, k. t. p. Ĉi tiu paŝo al forteco estis farita per la klopodoj de s-o Edwin C. Reed. Ĉi tiu federacio aliĝis al la Am. Esp. Asocio kaj s-o Reed fariĝis unu el ĝiaj tri konsilantoj. Poste fondiĝis ŝtataj federacioj en Pennsylvania, Indiana kaj aliaj usonaj ŝtatoj.

Ĝis tiam malmultaj Esperantistoj konis persone siajn samideanojn en aliaj urboj. Oni komencis pripensi kongreson amerikan, kaj dum la printempo de 1908 tri oficistoj de la Illinoisa Esp. Asocio s-oj Edwin C. Reed, Benedict Papot kaj Dr. W. H. Fox sendis alvokon per leteroj kaj anoncoj en la du ĵurnalojn (American Esperanto Journal kaj Amerika Esperantisto) petante, ke ĉiuj Esperantistoj, kiuj povas, kunvenu je la 19a de julio ĉe la Chatauqua lago en la ŝtato New-York. Ĉi tiu alvoko entuziasmigis la Esperantistojn kaj multaj promesis kunveni. La oficistoj de la Amerika Esp. As. konsentis, ke ĉi tiu kongreso estu oficiala kaj proponis, ke ili ĉiuj eksiĝos por ke la tuta Esperantistaro usona povu mem organiziĝi laŭ sia deziro. Dume „Amerika Esperantisto" rapide kreskis, pli rapide ol la alia ĵurnalo, kaj oni opiniis, ke pli bone estus havi unu fortan ĵurnalon ol du ne tre fortajn. Tial oni kunigis ambaŭ akceptante la iniciaton, ke la „American Esperantist Company" aĉetu la „American Esperanto-Journal", ĉesigu ĝian eldonadon kaj sendu de tiam al ĝiaj abonantoj la unu solan ĵurnalon „Amerika Esperantisto".

Je la deknaŭa de julio 1908 responde al alvoko de s-oj Reed, Papot kaj Fox pli ol cent Esperantistoj el diversaj partoj

de la granda respubliko kunvenis. Dum tuta semajno ili ĝuis la interparoladon, pripensis propagandajn metodojn kaj diskutis la organizadon. Ĉar la ĉefaj Esperantistoj el Kanado ĉeestis kaj esprimis fortan deziron esti anoj de la reorganizota asocio, sed ne tute ŝatis la nomon „Amerika“, oni decidis, ke la asocio estu nomata „Esperantista Asocio de Norda Ameriko“. La Esperantistoj alprenis novan konstitucion kaj elektis novajn oficistojn; kaj ĉi tio estis vere komenco de organizita laboro por Esperanto. La nove elektitaj oficistoj estis: prezidanto Kolonelo George Harvey, redaktoro de la grava jurnalo „North American Review,“ kiu tiam eldonis ĉiumonate kelkajn paĝojn esperante presitajn kaj jam treege helpis al la afero; sekretario: s-o Edwin C. Reed; kasisto: s-o Edward K. Harvey; komitatanoj: s-oj Papot, Reed kaj Fox. Post nur du monatoj la bedaŭrinda morto de s-o E. K. Harvey perdigis al Esperanto grandan helpon kaj orfigis la oficon de kasisto, por kiu oni elektis s-on Reed, kiu de post tiam ĝis nun estas ĝenerala sekretario-kasisto. (*Daŭrigo.*)

NIA LITERATURA KONKURSO.

Traduku el la bohema lingvo aŭ verku originalan unu- aŭ du-aktan komedion, kiun oni povus facile scenigi kaj prezenti ĉe niaj festoj esperantaj. Sendu la temon antaŭ la *1. de julio 1911* al la kancelario de B. U. E. (Praha II. Vodičkova 38.) kaj aldonu en fermita koverto vian adreson. La juĝantaro, kiu konsistos el membroj de la ekzamena komitato, aljuĝos al la plej bona laboro kiel premion grandan

PORTRETON DE DR. ZAMENHOF,

faritan kaj donacitan por tiu ĉi celo de firmo Straka en Č. Brod. (Vidu la anoncon.) Prezo de la bildo 25 K. La konkurson povas partopreni ĉiu abonanto kaj ĉiu membro de Unio.

Se almenaŭ kvin konkursantoj partoprenos, estos aljuĝita kiel la dua premio

PLENA KOLEKTO DE ĈIUJ ELDONAĴOJ DE NIA REDAKCIO,

kiuj aperis kaj aperos ĝis fino de tiu ĉi jaro.

Z CELÉHO SVĚTA.

VII. Světový Kongres v Antverpách (20.—27. srpna). L i t e r a t u r a k o n k u r s o: Každá korporace i jednotlivec může stanoviti thema i odměny za nejlepší práce, které budou předloženy literárnímu konkursu. Dosud vypsány tyto úlohy: Historie Espe-

ranta (as 20 str. 100 K. 50 K). Původní novela (12 str. 50 K). Užitek E. pro obchod; jak uvésti užívání E. do obchodních styků (5 str. 50 K). Užitek E. pro dělnictvo; jak zavésti užívání E. mezi dělnictvem (50 K). O staré vlámské škole malířské (30 K). Nejvhodnější a účinný způsob, jímž Esperantisté a hlavně mezinárodní kongresy dosáhly by u vlád zařazení Esp. mezi vyučovací předměty na středních školách (100 K). Brožura o užitku a činnosti insertní kanceláře Tutmonda Esperanta Anoncekspedo (25 K). Boj o nabytí jazykových práv v malých zemích, na př. v Čechách, Chorvatsku, Vlámsku a p. (5 str. 30 K). Volná Myšlenka v moderní literatuře (25 K). „Soneto" libovolné thema (12 K). Původní studie o historii, literatuře neb umění (100 K. 50 K). Čtyřverší (50 K). Stručné vysvětlení významu cheků a platebních poukázek a jejich význam v obchodním placení (62 K). Povídka, novela, báseň o libovolném thematu, napsaná osobou méně než 20letou (Umělecký předmět). Úloha ženy v esp. hnutí; jak zavésti E. do mezinárodních ženských institucí (30 Fr). — Tento konkurs jest přístupný každému. Adr.: Dr. Van der Biest-Andelhof, Antwerpen, Minderbroedersrui 76. (Lhůta končí 1. července). — Mezi projektovanými kongresními slavnostmi můžeme jmenovati divadelní představení Kaatje, nastudované herci král. nizozemského divadla. Návštěva divadla (krom záznamného 50 ctm. 1 Fr), jakož i zoologické zahrady a plesu jest pro účastníky kongresu bezplatná. Katolické a protestanské bohoslužby s esp. kázáním a zpěvy budou se konati 20. a 27. srpna. Předseda kongresního výboru generál Sebert (Paris, 51. rue de Clichy) přijímá návrhy, které mají býti pracovním schůzím předloženy. — **Národní svazy Esperantistů**: Société française pour la propagation de l' Esperanto sdružoval 5 federací a 119 spolků se 6743 členy; Germana Esperanto-Asocio 200 spolků se 6000 členy; Hispana societo por propagando de Esp. 1764 členy; Severoamerická Unie na 8000 členů. — **II. Sjezd Esperantistů-katolíků** bude pořádán 14.—18. srpna v Haagu. — V Santiagu bude zahájen 15. září sjezd čilských Esperantistů. — Kataluna esp. federacio uspořádá II. sjezd v Tarragoně. — **Vévoda Brunšvický**, který již delší dobu zajímá se o naše hnutí, sezval do svého zámku dne 13. února t. r. na 40 osob, mezi nimiž ministry, starostu, syndikáty Obchodní komory, zástupce průmyslu, škol i armády. Na programu večera byla přednáška dr. Kliemkeho z Berlína o Esperantu, jeho významu a rozšíření. Schůzi zahájil ministr vyučování s poukazem na význam přednášky, která má přítomným objasniti naše snahy a informovati je o podrobnostech, které jsou jim dosud většinou neznámy. Po řeči dr. Kliemkeho pronesl vévoda svůj názor o otázce pomocného jazyka, uznávaje řešitelnost tohoto problému přijetím jazyka umělého a vybízeje k pilnému sledování pokroků Esperanta. K nejrůznějším dotazům o výslovnosti, specielním užívání Esperanta v diplomacii a j. byly řečníkem a přítomnými zástupci esper. klubu podány vysvětlivky a důkazy. Schůze, která skončila v pozdních hodinách nočních, má veliký význam pro naši věc: na ni upoutána pozornost rozhodujících činitelů i veřejnosti. — V bavorském městě Milbertshofenu u Mnichova byla vložena **pamětní listina** do základního kamene nového kostela sepsaná německy a Esperantem. Starostou města jest předseda místního klubu Esperantistů. — **Arch. Agache** z Paříže, který byl loňského roku hostem klubu esp. v Libni, přednášel esperantsky v berlínském „Museum für Völkerkunde" o sociálním umění ve Francii. — **V Číně** nabývá

Esperanto pevné půdy; vedle kursů pořádaných již v některých městech vyskytují se i v časopisech zprávy o Esperantu: „Dži Bas“ doporučuje zavésti je do škol. — Budapešťská kancelář **turistická** („Cicerone“, Bud. VIII. Üllöi ut. 10) dopisuje a podává informace též Esperantem. — Na francouzských výstavách v Mans a v Roubaix bude Esp. zastoupeno vlastními exposicemi. — Esp. svaz na ostrově **Samosu** uspořádal ples, jehož se súčastnily vynikající osobnosti. Ples byl pořádán pod protektorátem prince-vladaře. — **Policejní kluby** něm. esp. jsou ustaveny v Drážďanech (70 členů), v Augsburku (26 čl.), S. Kamenici (25 čl.) a v Mohuči (10 čl.). Pařížský klub čítá 27 členů. — Ministr obchodu vyznamenal řádem „Officier d' Academie“ předsedu klubu Esp. **v Nevers** ve Francii za služby prokázané Esperantu pořádáním kursů. — „Franca Esperantisto“ uveřejňuje text zprávy o Esperantu předložené **generálem Sebertem** na schůzi arbitračního odboru francouzského parlamentu, kterou vyvrací náhled M. Novicowa, že francouzština mohla by zastupovati úlohu mezinárodního jazyka. — Na drážďanské hygienické výstavě budou prováděna cvičení vojenského „**Červeného kříže**“ s velením esperantským. — Obchodní komora ve **Florencii** věnovala místnímu spolku esp. 100 lir k účelům propagandy. — Francouzské denníky v **Troyes** vypsaly odměny 15 čtenářům, kteří vykáží se zkouškou o znalosti Esperanta. — Orgán Touring-Clubu v Mexiku uveřejňuje v každém čísle obsáhlou **rubriku** esperantskou. — Mexická spol. esp. byla vládou vyzvána, aby jí předložila za účelem informace zprávu o rozvoji a hnutí esperantském ve světě. — Rovněž „Dzien“ ve Varšavě vyhradil zprávám o našem hnutí zvláštní rubriku. — „Le Monde Espérantiste“ v Paříži, který jest též orgánem Mezinárodní ligy esp. dělnictva **tiskařského**, sděluje, že tisknou se již ve 276 tiskárnách texty esperantské; v Paříži jest jich 23. Šest sléváren písma vyřizuje v Paříži objednávky esp. liter. Firma Deberny vydala vzorník obsahující přes 100 vzorů písma s esp. písmenami. Sekretáři ligy výše jmenované jest známo přes 500 osob z tiskařského dělnictva, které ovládají Esp. — **Esperanto a reklama**: Mezinárodní hygienická výstava v Drážďanech rozesílá své prospekty a brošury též v Esperantu. Zašlete 25 hal. (coupon-rép.) dr. Schrammovi (Dresden 20) a obdržíte cennou ill. knihu esperantskou zdarma. Berlínská výstava turistická zve k návštěvě esperantskou reklamní brožurou redigovanou ve formě zábavné povídky. (Dopište výstavnímu výboru v Berlíně S. W. 68. Lindenstr. 16. 18. a přiložte 2 coup-rép.), — Orgán **kadeřníků** „Le Capilariste“ (Paris, 40. rue de Moscou), jehož red. E. Long jest horlivým Esperantistou, obsahuje nyní vedle textů národních i text esperantský. Red. oznamuje, že tímto rozšířením svého programu vyhovuje zároveň potřebě založení orgánu kadeřníků, jímž měl se státi „La Barbiro“, vydaný p. Jarošem ve Vídni. — Arnold Behrend uveřejnil velmi zajímavé články o Esperantu v životě praktickém (viz **Dokumente des Fortschritts**, č. 2.) a o Esp. ve vědě a literatuře (Germana Esperantisto. č. 4.). Jak známo, přináší téměř v každém čísle výše zmíněná německá revue významné zprávy ze světa esperantského.

ESPERANTA MOVADO INTER BOHEMOJ.

VÝLET NA KŘIVOKLÁT

pořádá v neděli, dne 21. května společně s pražskými kluby sdruženými v **Ústředním Svazu Bohema Unio Esperantista Klub Esperantistů v Rakovníku.** *Účastníci výletu prohlédnou dopoledne hrad a odpoledne podniknou vycházku do překrásných lesů křivoklátských. Přihlášky a záznamy na společný oběd přijímají pp. jednatelé místních spolků (v Praze kancelář Ústř. Svazu BUE. Vodičkova ul. 38.). Všem účastníkům budou veškeré bližší informace v čas sděleny písemně. Odjezd z Prahy v 6·05 h. ráno z nádraží Františka Josefa. (Za každého počasí.) Použijte této příležitosti k osvěžení a zábavě!*

Za pořadatele: H. Černý v Rakovníku, Fr. Poustka v Praze.

JUBILEJNÍ SLAVNOST RAK. ESPERANTISTŮ

koná se v Brně ve dnech 3.—5. června t. r. na paměť 10letého trvání prvního esp. spolku v Rakousku. Přihlášky přijímá **Klub českých Esperantistů v Brně, Kozí ul. 10.** *Přednášky. Prohlídka města. Schůze. Výlet k Macoše (136 m) a do nových jeskyň.*

La JUBILEA FESTO DE AŬSTRIAJ ESPERANTISTOJ okazonta la 3.—5. de junio estas aranĝata de la Klubo de Bohemaj Esperantistoj en BRNO. La komitato esperas, ke ĉiu aŭstria samideano, apartenanta al kiu ajn nacio, partoprenos, ĉar la festo devas montri, kiel progresis post dek jaroj nia movado en Aŭstrio; ĝi devas refoje pruvi al la nekreduloj, ke la reciproka komprenado per artefarita lingvo estas ebla kaj efektivita per Esperanto. La festo estos grava por la movado en tuta Aŭstrio. Ĝi ne estos io oficiala, sed amika kunveno celanta reciprokan konatiĝon kaj fortiĝon en komuna laborado. La sperto montris, ke de tiaj amikaj festoj oni forportas belajn rememorojn kaj entuziasmon kaj instigon por plua laboro. Estu ĉiu konvinkita, ke la komitato zorgos pri agrabligo de lia ĉeestado. Oni sendu sian aliĝon al Klub Českých Esperantistů Brno, Kozí ul. 10. — Programo: Sabaton vespere: akcepta festo. Dimanĉon: Bohema propaganda parolado pri Esp. Vizito de vidindaĵoj en la urbo. Kunveno (vespere). Lundon: Ekskurso al Macocha (abismo 136 m profunda). Ĉiuj detalaĵoj estos anoncitas per afiŝoj. — La klubo estas kontenta je rezultato de siaj ĝisnunaj kunvenoj kaj amuzoj; ĉe unu parolis s-o V. Odložilík pri la praktika uzo de E. — E. K. en **Praha** invitis nin al **amuza vespero,** kiu okazis la 6 de majo en la salonoj de Českoslov. Obch. Beseda en Jerusalemská ul. 7. Sur la programo **du** unuaktaj komedioj **esperantaj:** Balŝuetoj. Du biletoj. Ni povas plezure noti, ke la plejparte esperanta programo plaĉis al ĉiu; la organizintoj de tia vere esperanta amuzo estu konvinkitaj, ke ilia peno estos ĉiam rekompencata per laŭdo de la gastoj (tiun ĉi fojon estis reprezentataj krom la kluboj antaŭurbaj ankaŭ Kladno, N. Bydžov kaj Verda-Stelo-Prag), kiuj multe ŝatis tian elekton de la programo. Krom la bohemaj pecoj „Geavoj" (f-ino Vaněčková kaj s-o Martinec), Hradčanské písničky (s-o Kadečka) kaj la sceno de imitatoro s-o Bělský ni plenkontente aŭskultis deklamaĵojn de nia plej juna samideano Novák (8-jara), recitaĵon de s-o V. Procházka (J. A. Comenius, orig. poemo de dr. Schulhof), la korŝiran kantaĵon de s-oj Fr. Novák (trad.), Poustka, Martinec (kun celtrafaj

bildoj) kaj la du nomitajn komediojn, en kiuj f-inoj Žabková kaj Vaněčková, en la alia (trad. de s-o Dus) f-ino A. Wenzelová, s-oj Tobek kaj Dus pruvis la talenton, tiel plaĉe valorigi sur la scenejo sian perfektan scion de Esperanto. La fraŭlinoj ne forgesis eĉ je riĉa bufedo, kiu trovis tre bonan debiton. Ni dankas al ĉiuj kaj ni esperas, ke la simpatio de ĉiuj gastoj estos por ili instigilo ĉe plua laboro por Esperanto. - La 23. IV. vizitis la membroj de klubo la ekspozicion de antikva japana arto en Rudolfinum. Por somero estas projektataj dimanĉaj ekskursoj. — La reprezenta vespero de E. K. en **Žižkov** okazinta la 9. IV. en Č. O. B. havis la plej kontentigan rezultaton. La programo estis riĉigita per unuakta komedio „Delikátní poslání" en kiu f-inoj Kosteláková, Wenzelová kaj s-o Winter plene meritis ĉiun laŭdon por sia bela ludo, kaj per serio da belsonaj kantoj de s-o B. Neuman. Je fino de la vespero tre bone amuzis nin simpatia imitatoro de kantistinoj s-o Bělský, kies apero sur la scenejo kaj eleganteco de mimiko, per kiu li akompanis sian kanton, alportis al li vivan aplaŭdon. — Laborista K. E. en **Praha VII.** elektis en sia ĝen. kunveno la 28. IV. s-on V. Zvoníček prezidanto, s-on Jos. A. Vaněk (sekretario (adr. Praha VII. 976. F-o Rašín). La kunvenoj okazas ĉiun duan vendredon en rest. Kovrzka (apude de kafejo Belcredi). — E. K. en **Kladno:** La 16. IV. parolis antaŭ 200 personoj en la halo de „Sokol" s-o Jos. Šídlo el Praha VIII. pri Esperanto. La kunvenon malfermis prez. de la Klubo s-o O. Kočí per cito de la tasko, kiun sekvas la klubo. La gastoj havis okazon tralegadi riĉan kolekton da esp. poŝtkartoj ricevitaj el la tuta mondo. Vespere okazis koncerto en Konvikt. Kurso elementa daŭras ĉiun mardon, supera jaudon en lernejo „ĉe s. Floriano". Esp. informejo estis starigita en Tyršova ul. 903. — E. K. en **Č. Budějovice:** la ĝen. kunveno la 15. II. elektis s-ojn F. K. Svačina prez., V. Panuš viceprez. kaj V. Matuš, H. Weselka, Slivka, Fessl, Mikeš, f-o Maťhová. Dum la pasinta jaro estis organizitaj krom koncerto kaj amuzoj du kursoj gviditaj de s-o Svačina. Lia peno estas rekompencata per vigla ĉeesto al la merkredaj kunvenoj, kie la ekslernantoj perfektiĝas en interparolado. — En **Příbram** laboras pri fondo de klubo s-oj B. Jech ka Fr. Pokorný, kiuj forsendis jam la regularon al landestrejo. Publika parolado estas projektata. En loka gazeto „Spravedlnost" aperados informoj pri Esperanto, redaktataj de s-o Jech. — E. K. en **Rakovník** invitas al ekskurso, kiu okazos dimanĉon la 21. de majo. La gastoj el Praha kaj el la ceteraj urboj kunvenos kun la membroj de la klubo en kastelo Křivoklát, kiu estas celo de tiu ĉi ekskurso. Kiu el Praha volas partopreni, skribu al B. U. E. (Korekto: En la 3-a n-o aperis preserare sciigo pri s-o Kočí, kiu vizitis la fondan kunvenon kiel gasto kaj ne kiel honora membro. La kunveno elektis kiel honoran membron de la klubo s-on H. Černý por rekompenci lian sindonemon al nia afero kaj lian laboron dediĉatan por la klubo.) — En **Písek** instruas ĉe la knabina komerca kaj industria lernejoj pri Esperanto s-o J. Železný kun bela sukceso. En la tiea gimnazio li havis paroladon pri E., kiun akompanis ekspozicio de verkoj kaj poŝtkartoj esp. Ni atendu, ke lia nuna restado en Prachatice rezultigos novan klubon. — E. K. en **Radvanice** (Silezio) elektis en sia eksterord. ĝen. kunveno la 9. IV. s-ojn Fr. Dvorník prez., Rud. Svoboda vicprez., Fr. Stachura sekr., Fr. Sokolský kas., J. Růžička protok., Beran bibl. — Hlasy z Hané en **Prostějov** enhavis jam kelke da artikoloj tradukitaj de s-o prof. Pitlík per helpo de Esperanto el lingvoj rusa, flandra, hinda kaj

araba. La klubo eldonis informan boheman broŝuron pri U. E. A. — „Osvěta Lidu“ en **Pardubice** enhavas rubrikon pri Esperanto, redaktatan de s-o Dr. Schulhof. La gazeto estas unu el la plej gravaj ĵurnaloj bohemaj kaj ĝia favora akcepto de Esperanto havos grandan influon inter la legentaro. — „Přehled Revuí“ en **Praha** (dusemajna revuo de bohemaj revuoj) anoncas en sia 1. n-o VII. la 11. de marto, ke la redakcio plene aprobas Esperanton kaj tial ke ĝi ne represados plu raportojn idistajn ĉar ili flankiĝas en la lasta tempo de ĝentila formo kaj de honesta kritiko. La red. ne plu citos la nomon de Ido en titolo de la rubriko pri lingv*oj* internaci*aj* sed ĝi titolos la rubrikon kiel antaŭe, sole: „Esperanto“. — „Kutnohorské Listy“ alportis longan kaj favoran raporton pri la amuzo de la loka K. E. aranĝita la 23. III. en Měšťanská Beseda. — Sur la scenejo de „Kabaret Lucerna“ en Praha aperis Esperanto: unu aktorino, ludanta rolon de fremdulo, uzas en la tuta peco sole Esperanton; ni povas kontentige noti, ke tiu ĉi ideo — paroligi aktoron esperante – venis laŭ propra iniciato de verkisto. La bona akcento kaj elparolado meritis aplaŭdon. — TRIA KUNVENO de Esperantistaj el ORIENTA BOHEMUJO okazos la 21. de majo en Král. Hradec. Komenco je la 3. horo posttagmeze. La programo estos tre alloga amuza kaj instrua. Ĉiuj Esperantistoj kaj amikoj de nia lingvo estas kore invitataj.

Pri la detalajoj koncerne la II. AŬSTRIAN KONFERENCON ni parolos en la sekvonta numero de Č. Č. E.

BIBLIOGRAFIO.

Hachette & Cie, Paris, 79. Bd. St. Germain:

Poliglota Vademecum de Internacia Farmacio de C. Rousseau- 288 pĝ. 17 × 25). Prezo Fr. 7·50 (3 Sm). Jen modela verko, admirinda pro sia pleneco kaj signifo: per ĝi estas ebligite al ĉiu nacia farmakopeo preparadi medikamentojn laŭ receptoj alportitaj el fremdaj landoj. Ĉar la ĥemio necesigos pro sia vasteco vortarojn apartajn, la 14 aŭtoroj (el 9 diversaj landoj) elektis por sia libro nur la nomojn de farmacio kaj drogoj de animala aŭ vegetaĵa deveno, stariginte esperantan liston de 1200 terminojn kun traduko en naŭ lingvoj: angla, franca, germana, hispana, holanda, itala, rusa, sveda kaj latina. La unua ĉapitro enhavas ĉiujn utilajn tabelojn kaj terminojn (signojn) komune uzatajn. La dua donas formularon de kelkaj oficialaj medikamentoj, naciajn leksikonojn, ekzemplojn de diverslandaj receptoj kaj gramatikon de E. en la suprenomitaj lingvoj. Per Esperanto fariĝis la libro uzebla por ĉiu, kiu, komprenante la valoron de tiu ĉi verko, dediĉos al ĝia trastudo iom da tempo. Prezidanto de la Kuracista Asocio Esper. Dr. H. Dor esprimas en L. I. la opinion, ke ankaŭ la kuracistoj ne tro longtempe prokrastos la eldonon de simila Medicina Vortaro. — P. Mérimée: *Karmen*. Trad. *Sam. Meyer* (56 pĝ. 16 × 20). La tre bonstila traduko de la fama franca romano meritas plenrajte nian aprobon kaj rekomendon. Certe la nomo de la tradukinto mem garantias, ke lia verko plaĉos al ni en ĉiu rilato. — *Dictionnaire Usuel Esperanto-Français* de E. Grosjean-Maupin. Kolekto de

la Revuo (144 pĝ. 9 × 17). Prezo bind. 1 Fr. La libro estas, laŭ esprimo de la eldonejo, natura sekvo de la „Dictionnaire Complet“, el kiu ĝi estas ekstraktita. La „Kompleta Vortaro“ enhavas ĉiujn ekzistantajn malbonajn kaj neimitindajn vortojn, kiujn oni povas renkonti (*kaj ankaŭ nerenkonti!!*) ĉe sia legado. Pri multaj estas utile diri, ke ili estas „korektigo“ de Zamenhofa Fundamenta Universala Vortaro aŭ tute freŝbakitaj francaĵoj, por ni, Slavoj, absolute nekompreneblaj eltrovaĵoj de aŭtoro („aŭtoro de vortaro“ en la plej pura senco de tiu vorto, t. e. kiu mem ankaŭ aldonis kelke da s i a j vortoj). En la citata vortaro „Usuel“ estas sole nemultaj per steleto signitaj novaj terminoj. — *Cours méthodique d'Esperanto.* Corrigé des Thèmes. Camille Aymonier et E. Grosjean-Maupin. Kolekto de la Revuo (92 pĝ. 10 × 18). Prezo Fr. 1·20. Pro multe da nekonataj, novaj terminoj kaj afiksoj, kiuj ne apartenas en l e r n o-libron, ni ne povas rekomendi tiun ĉi verkon, precipe ĉar ekzistas jam aliaj, multe pli sinceraj verkoj por Francoj. Ni simple ne komprenas la novajn terminojn, kaj ni ne scias, kiel ni komprenos samideanon, kiu lernis laŭ t i a verko.

Esp. Centra Oficejo, Paris, 51. rue de Clichy:

Sesa Universala Kongreso de Esperanto en Washington 1910. Esperantista Dokumentaro (72 pĝ. 16 × 24). Prezo 1 Fr. Enhavo: Parolado de dr. Zamenhof. Protokoloj kaj aldonoj, de kunsidoj ĝeneralaj kaj specialistaj. Nomaro de kongresanoj. Tiu ĉi grava dokumento de nia historio nepre troviĝu en biblioteko de ĉiu klubo, same kiel ĉiuj ceteraj eldonaĵoj de Centra Oficejo. — *Le problème de la langue internationale.* E. Boirac, recteur de l' Akadémie de Dijon. Extrait de la Revue pédagogique du 15. janvier 1911 (16 pĝ. 13·5 × 21·5). [Prezo 25 ctm. — *Per Espero al Despero.* Dek poemoj de Dr. S t a n i s l a v S c h u l h o f. Chrudim (30 pĝ. 11 × 15). Prezo 60 hel. Niaj legantoj havis jam okazon admiri la belritmajn versojn de tiu ĉi aŭtoro en nia revuo. Ni povas senriproĉe diri, ke la nomita kolekto da o r i g i n a l a j poemoj estas rimarkinda pro sia riĉeco de ideoj kaj bonega elekto de versoj, kiuj sonas tiel freŝe, tiel vive en lia Esperanto, kvazaŭ li skribus en lingvo natura. Legu antaŭ nekreduloj kelke da linioj kaj se nur iomete da bona volo li havas por juĝi, certe ili admiros Esperanton, kiu estas tiel elasta kaj formoriĉa en plumo de poeto. Certe pli ol unufoje aperos recitajoj de kelkaj poemoj sur la programoj de esperantaj amuzoj. (Interalie estu aldonite, ke la vorton „despero“ en la titolo ni ne aprobas; kelkaj eble preseraroj facile korekteblaj ne malhelpas la leganton). — O s k a r W i l d e: *Salome,* dramo en unu akto; trad. H. J. Bulthuis. Amsterdamo, C. L. G. Veldt (39 pĝ. 14 × 21). Prezo nemontrita. Per tiu ĉi volumo aperas nova kolekto „Esperanta teatro internacia“, por kiu estas preparataj de la sama tradukinto la plej famaj teatraĵoj. Se ĉiuj estos tiel zorge verkitaj, kiel la n-o 1, la kolekto fariĝos potenca faktoro en mano de propagandistoj kaj kontentigos la literatur-amantojn. — A. R i v i e r: *En Rusujo per Esperanto* (129 pĝ. 12 × 17). Prezo 60 kop. (Sm (0·63). Moskva librejo „Esperanto“. La aŭtoro, Franco, priskribas per flua, bonstila Esperanto la tempon da kelkaj monatoj, kiujn li pasigis en Rusujo ĉe sia korespondanto, invitinta lin alveni gaste el Alger. La rakonto amuzas, ĉar jen estas bonega dokumento, kiel Esperanto servas al turisto nescianta la enlandan lingvon! La enhavo de la verko estas interesa, sen tedigaj stati-

stikoj kaj historiaj datoj Rim. pĝ. 84. lasta linio: anst. ilia: *sia*: pĝ. 107. linio 6. anst. iliaj: *siaj*; pĝ. 119. linio 18. anst. lia: *sia*. Ruĝebrodita (pĝ. 94.). nigratero (91): po du vortoj! — *Oficiala Jarlibro de U. E. A. 1911* (135 pĝ. 11 × 16). Prezo 30 Sd. (Por membroj senpage). Regularoj. Informoj pri U. E. A. Adresaro de 900 delegitoj kaj Esp.-Oficejoj.

Esperanto snadno a důkladně za 20 hodin. Pro mládež, samouky a kursy. Zpracováno zkušební komisí esp. spolku J. A. Komenský v Chrudimi (96 pĝ. 13 × 18). Prezo K 1·20. Nova lernolibro por Bohemoj. Parolante pri ĝi (kiel aŭtoro de lernolibro laŭdire pli bona), mi bedaŭras, ke mi povas laŭdi sole la energion de la eldoninto, sed absolute ne la verkon mem. Ĉu tian Esperanton instruas la verkintoj t. e. „Ekzamena komisio“ de la klubo en Chrudim al siaj kandidatoj? Ĉu la facileco vidiĝas en tio, ke jam sur la sepa paĝo estas traduko de la bohema nacia himno (erara) kiel IV. leciono (el dudek)? La materio estas dividita je multego da duon- eĉ trionpaĝaj lecionetoj, sed senmetode — la parto gramatika kaj la lecionoj neniel rilatas unu la alian. Tiom da eraroj en la lingvo instruata la instruisto ne devas fari, por ke la lernantoj mem ne ekinstruu lin pli frue ol li finlernos la lingvon. Kaj ĉi tion subskribis ekzamena komisio de la klubo? Kiu estas tiu komisio, kiu skribas: *Kie mia dom' - kde domov (sic) můj*. Rim. sur la pĝ. 42.: por ke oni povu la tradukitan kanton kanti, elparolu la unuan vorton *kie* kiel *kje*. (Tio ĉi estas tre grava eraro, kiu nenie en la bona esperanta literaturo trovos imitaĵon, tiom malpli eble modelon). Domov ne estas *dom'* sed *hejm'*. Tiel ne devas aspekti la tradukaĵo de nia nacia himno! Simila eraro: *kiel flor'* elparolu *kjel flor'!* Ne *Slavanoj* sur pĝ. 19., sed *Slavoj*, kiel oni bone trovas sur pĝ. 44 Ne *komencos la kurso, la tagmanĝo* sed *komenciĝos*. Ne *desirus* sed *dezirus* pĝ. 24. Ne: *oni povas lin pendigi aŭ senkapigi laŭ plaĉi;* sed *laŭ plaĉo* aŭ *laŭplaĉe* (pĝ. 29.). Ofte *auskultu* anst. *aŭskultu;* tia ofta „preseraro“ ne konvenas por lernolibro. *Delasu la popolon, ke ili iru kaj aĉetu la manĝaĵojn por ili* (pĝ. 33.). Kion ĝi signifas? Ĉerpi el malbonaj kaj erarplenaj fontoj ne estas konsilinde, sed aŭtoro de lernolibro almenaŭ devas trovi, kio estas bona kaj kio rifuzinda pro eraroj. *Ke - liberigu* ne estas *at osvobodím!* sed *ke - mi liberigu! Poste senvestiĝis* - subjekto! . . . *La ponto cent metrojn de longo!!* Tiu ĉi franca Esperanto neniel povas esti rekomendata! — Sur la pĝ. 63.: *kio ajn - cokoli, kion ajn - jakoukoli*. Ho ne, tute ne, la dua formo estas sole akuzativo de la unua formo, tradukita bohemen ĝi refoje estas *cokoli(v)*. *Jakoukoliv* oni diras *kian ajn*. Kion signifas sur la pĝ. 73. tiu ĉi frazo: . . . *la patrino ankoraŭ neniam kisis Karlon kun tia varma amo ol pro tio* (*pro kio*) *kial li antaŭ nelonge ricevis batojn*. Sur multaj lokoj estas vortoj neesperantaj kaj sendube de la aŭtoro mem kreataj, ekz. *leo* (anst. leono), *par ekzemple* (anst. *ekzemple, na* příklad): mallongigo *p. e.* (!), *ekzaminata* (anst. *ekzamenata* komisio!), *per ano* (anst. *por jaro, aŭ jare*). Sur la kovrilo: . . . *kun ora kaj ŝtata medalo premiitan* (per . . . medaloj). *Antaŭgarda marko* (?). *Ŝtofoj garantitaj? Esperanto dume duono da tagoj* (Tiel?) *Unugrada ingredienco* (anst. unuagrada ?) Kafopluaĵo ? ? (ĉu cikoria surogato ?) Se ni volus ĉiujn erarojn citi, ni bezonus ankoraŭ almenaŭ unu paĝon, kiu estus tro kara por tia celo. Por rebonigi la verkon oni devus ĝin ne sole korekti laŭ la lingva flanko sed precipe laŭ la pedagogio, t. e., ke la lernanto trovu en la tekstoj por traduko tion, kion li lernis kaj ne

kion li lernos. Kvankam estimante la aŭtoron, sed tamen amante Esperanton pli multe, ni *devas* diri: la libro estas malbona, netaŭga. La artikolo „Pli multe da sincera kritiko“, kiu aperis en la antaŭa n-o, estu relegita de tuj, kiuj opinias, ke ne estas ĝentila konduto kritiki sincere la verkojn de Esperantistoj.

KORESPONDANTOJ: *28. F-ino Ivanka Angelova, studentino, *Pleven*, 28. str. L. Karavelov, Bulgarujo. — *29. S-o J. M Bakalář-Srbecký, *Angern* ap. Wien (il. k. precipe kun Rusoj). — *30. S-o Ferd. Geier, *Budapest*. VII. Dob. -u 29. I. Hungarujo (il. k. let.). — *31. S-o Roman H. Kaminski, juristo, *Kolomyja*, Galicio. — *32. S-o K. Gotaas, *Trondhjem*, Sindssygeasylet, Norvegujo (il. k. kun Bohemoj). — *33. S-o Peter Becker, *Mainz a. R.*, Holzstr. 10. Germanujo. (Čiam resp.). — *34. S-o Ab. Klimovskij, *Zolotonoŝa*, Čerkas. ul. 20. Rusujo. Poltava (pri vivo kaj moroj). — *35. S-o Sigw. P. Berge, *Christiansund*, Norvegujo (p. m.). — *36. S-o Iv. L. Zacharov, kontrolisto, *Moskva*, Andronovskaja pl. 5/9. Rusujo. - *37. S-o Westmancote, „Fernville“, Langdon Rd. *Cheltenham*, Anglujo (tuj resp.). — *38. S-o Rob. S. Woolf, stenogr. *Blairsville*, 146. W. Market, U. S. Ameriko. — *39. Junaj lernantoj dez. korespondadi. Skribu al red. de „La Movado“, *Paris*, 31. bd. St. Marcel. — *40. S-o Cuny Karlo, *Paris*, XX. 33. rue du Borrego (kor. per let.). — *41. S-o Marius Gontard, *Avignon*, 3. pl. au Change, Vaucluse, Francujo. — *42. S-o E. Gombos, *Újvidék*, Aŭstr.-Hung. Banko. Hungarujo.

Výlet Esperantistů na hrad Křivoklát.

Neděle, 21. května.

Informace B. U. E. (Čtěte str. 59.).

Eldonanto: Ed. Kühnl. — Presejo de Národní tiskárna a nakl. JUDr. Edvard Jan Baštýř a spol. Praha.